



La Verda Stelo



**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

januaro 2013



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, N.R. Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 Klubkunvenoj
- 4 Naskiĝtagoj
- 5 Kasisto
Pri la nordo
- 12 Esperanto-tago en Eindhoven
Tasko
- 13 Recepto
- 14 Kasisto
- 15 Sudoko

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2012

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland,
Monnikendam

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,00
Gezinslid	€ 10,00

Klubkunvenoj

januaro 2013

- 17 alternsemajna ripetaĵo
31 krucvortenigmoj

februaro 2013

- 14 gramatiko
28 frambokuko

marto 2013

- 14 jarkunveno

La estraro de *Esperanto Noord-Nederland* kore invitas vin partopreni en la jarkunveno.

Ni parolos i.a. pri nia revuo.

aprilo 2013

- 11 Ineke prelegos pri Armenio
25 lingva rubriko

majo 2013

- 23 fino de la sezono,
ĉe "Il Lago" ekde la 6-a horo

somerkunvenoj:

julio 2013

- 11 19.45 "*lokaal Ambrosius*"
Nieuwe weg 20A, Groningen

aŭgusto 2013

- 24 15.00 "*High Tea*", Feithhuys
Martinikerkhof 10, Groningen
Bonvolu aliĝi antaŭ la 5-a de aŭgusto!
(050 5251436/ nrkielklunder@hotmail.com)

septembro 2013

- 12 Ni parolos pri ferioj

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia
retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

Naskiĝtagoj

januaro

- 4 Wil van Ganswijk-Vlasblom
- 17 s-ro Ploeg
- 27 Ineke Emmelkamp

februaro

- 11 Henk van Kappen
- 18 Stanislawa Czeswinska
- 28 Luit Staghouwer

marto

- 24 Berg Begeman

aprilo

- 1 Tiny Bulk-Beenen
- 6 Petra van Kappen-van de Kamp
- 7 Ans Hooymans
- 7 Ankie v.d. Meer

majo

- 5 Gonda Kruijer
- 7 Gerard Boer
- 23 Frans Schild
- 25 Albert Hoekstra
- 27 Warner Renken

junio

- 1 Adri Oosterwijk-Dominicus
- 16 Harm Roeters
- 24 s-ro Snoek

aŭgusto

- 10 Nelly Kiel
- 16 Koos Scharroo
- 30 Johan Swenker

septembro

- 3 Wiebren Akkerman
- 5 Berendina Brink
- 7 Marita Kruijswijk
- 17 Henny van Hogen-Cornelissen
- 24 Els van der Heij-Alblas





Oproep van de penningmeester

Geld moet rollen!

Van leden die in het krijt staan kan een vereniging niet bestaan. Je moet je geld niet over de balk gooien, maar op de pof leven is ook niet echt zinvol. Zowel de leden als de penningmeester moeten de tering naar de nering zetten. Het moet uit de lengte of de breedte komen.

Betaal daarom binnenkort de contributie, dan kan de penningmeester de eindjes weer aan elkaar knopen.

Op bladzijde 2 van de *informilo* vind je alle gegevens die je nodig hebt om de contributie te kunnen betalen. Alvast bedankt voor de medewerking.

Luit Staghouver (penningmeester)

NB De leden en abonnees die de contributie al hebben betaald worden hartelijk bedankt.



6 septembro 2012

Ĉeftemo de la kunveno: *Ferioj*.

Partoprenis en la renkontiĝo de *Bad Zwishenahn* niaj membroj Wil, Ineke, Nelly, Wiebren kaj Johan.

La estro de la vizitita fiŝfumaĵejo/-vendejo multe rakontis pri sia profesio.

Bedaŭrinde oni ne vizitis la fumaĵejon. La gastoj gustumis la fiŝaĵojn kompreneble, la opinioj pri la gustumitaj fiŝaĵoj estas diferencaj.

El la korespondado de Ineke kun grupo de studentoj en *Emden* (Germanio) ne rezultis renkontiĝo.

Ankaŭ ĉi tiun jaron nia klubo havis budon dum la Liberiĝ-festivalo, sed neniu anoncis sin por kurso. Tamen la deĵorantoj estas kontentaj pri la festivalo, ne nur ĉar la muziko ĉi-foje estis malpli laŭta ol antaŭe.

Wil veturos al *Eindhoven* por partopreni en promeno tra la urbo kun esperantistoj.

Ineke veturos al Amsterdamo por rakonti en Esperanto-medio pri sia vojaĝo al Turkio.

Gonda veturis al la subĉiela muzeo en *Arnhem*. Ŝi montris al la ĉeestantoj belan foton de granda *sulfura fungo* (*Laetiporus sulphureus*).

Ineke ne plu estas estrarano pri informado de Esperanto Nederland, sed estrarano sen difinita tasko. La estraro de Esperanto Nederland ne estas kompleta, ĉar mankas prezidanto kaj sekretario.

Ineke feriiis en julio. Ŝi restis kelkajn tagojn en *Oostende* kaj poste veturis al *Rouen* (Francio) por ĉeesti la edziniĝon de amikino.

En Hago ŝi vizitis la muzeon *Meermanno*, en kiu estis la ekspozicio *Leestekens* (interpunkciaj signoj) kaj ankaŭ ekspozicio de la edzino de *Maarten Toonder*.

La lastan semajnon de siaj ferioj Ineke estis hejme kaj aranĝis siajn venontajn feriojn al la Kanariaj Insuloj.

Luit ĝuis mallonge somerajn feriojn en la ĉirkaŭaĵo de *Ommen* kaj *Dalfsen*.

Nelly veturis al la brita insulo *Guernsey*, kiu situas proksime al Francio, kaj kie oni



parolas la anglan lingvon. Guernsey havas proprajn registaron kaj leĝojn, sed ne universitaton. Studentoj pri juro devas studi dum kelkaj jaroj en Anglio kaj poste dum unu jaro en Francio. La insulo estas *imposto-paradizo*.

Gonda laboris dum la feria periodo kaj nun ŝi ferias dum unu semajno.

Wil partoprenis vendo-demonstracion, kaj kvankam ŝi decidis nenion aĉeti, ŝi ne povis ne profiti la promesitan rabaton, kaj pro tio ŝi faris per aŭtobuso malmultekostan kvartagan vojaĝon al Svislando. Estis ferioj plenaj de surprizoj. Ŝi vizitis kelkajn lokojn, kie ŝi jam estis

antaŭ multaj jaroj (ekzemple en 1955). La aŭtobusveturado estis tre agrabla, kaj la pejzaĝo tre bela.

Luit Staghouver

20 septembro 2012

Dum la kunveno de la 20-a de septembro Luit regalis nin per kuko. *Josef*, la konga esperantisto, kiu rifuĝis en Pollando, finstudis en politeknika universitato, kaj rajtas resti en Pollando ĝis la 4-a de julio 2014. Li do ne plu daŭre devas petadi restadon en Pollando.

Nelly estas kantistino. Ŝi kantas en *Choral Voices*, preskaŭ profesia ĥoro, kiu kantas anglajn religajn kantojn. Kristnasko do estas grava periodo por la ĥoro. Ili decidis kunkanti kun ĥoro *Magnificat* el Emmen. En la kristnaska periodo ili kelkfoje kantas *Magnificat* de *Rutter*. Pro la ekzercado Nelly ne povos veni al niaj klubkunvenoj dufoje.

La Esperanto-kurso de Wil estas tre konata. De kiam ŝia filo ŝanĝis la kurson en interagan kurson, ŝi mem ne plu aktivas kun la kursanoj. Nur je la 14-a leciono la komputilo ne povas korekti la respondojn. Tiam la kursanoj sendas malgrandajn rakontojn al Wil, kaj kelkfoje ankaŭ dankas ŝin, kiam ili finas la lastan lecionon.

Wil havas 13-jaran kursanon *Frank*, kiu loĝas apud *Eindhoven*. Kiam estis tie Esperanto-kunveno, ŝi invitis lin, kaj ankaŭ mem iris. Li ne nur komprenas Esperanton, sed ankaŭ babilas en Esperanto. Wil estas fiera kvazaŭ avino.

La temo de la kunveno estas: *voĉlegu ion*. Ĉiu do kunportis libron. Luit voĉlegis kelkajn spritaĵojn el antikva libro eldonita de *Hachette* en 1908. Ankaŭ Wil voĉlegis

kelkajn spritaĵojn.

Johan hazarde trovis la libron *R.U.R., Rossum's Universal Robots* de Karel Čapek en iu malnova librokolekto. La libro estas grava, ĉar ĝi menciis la vorton *roboto* por aŭtomatoj unuafoje. *Roboto* devenas de la ĉeĥa vorto por servutulo (*lijfeigene*).

Ni aŭdis ankaŭ ĉapitron VII de *Alico en Mirlando*. Nelly ja ŝatas anglajn rakontojn. *Johan Swenker*

4 oktobro 2012

La 4-an de oktobro okazis nia Malferma Vespero. Ĉar la 4-a estis ankaŭ la internacia tago de bestoj, la temo estis: "*hoe blaft een hond in het Esperanto?*" Ni akceptis tri gastojn. Johan malfermis la vesperon kaj gvidis laŭvican sinprezenton. Post tio li rakontis pri Esperanto kaj instruis iom per bildo.

Nelly fabrikis ludkartojn kun bestoj: masklo-ino-ido, ekzemple virhundo-hundino-hundido (reu-teef-pup).

Ekspliki Esperanton estas pli facile ol la nederlandan. Estis malfacila ludo: ne ĉiuj sciis la nederlandajn nomojn de bestoj!

18 oktobro 2012

Wiebren rakontis, ke dum 21 jaroj li regule vizitis Pollandon en la kadro de *ĝemelaj urboj*. Li tie parolas en la germana lingvo kun la enloĝantoj de la urbo. Kompreneble li klopodis enkonduki Esperanton, sed ne sukcesis. Nun la projekto pri la ĝemeliĝo oficiale finiĝas. Harm kaj Björn estas malsanaj. Ni sendosal ili karton kun bondeziroj! Johan rakontis pri sia vizito al la suda parto de Nederlando.



Li unue vizitis kun Hanneke la *Floriade* kaj poste la *Ĝardenojn de Appeltern*. *Floriade* estas grandega internacia ekspozicio pri floroj kaj agrikulturo.



Appeltern estis por li pli interesa. La parko estas 22 hektarojn granda kaj havas pli ol 200 diversajn ĝardenojn. Kunlaboris pluraj famaj ĝardenarkitektoj. Johan rakontis kaj montris belajn bildojn, i.a. de diversaj akvo-projektoj!



Li certe ekhavas kelkajn novajn ideojn por sia propra ĝardeno. Li rakontis tiel entuziasme, ke mi forgesis noti la detalojn!

Ineke Emmelkamp

1 novembro 2012

Ĉeftemo de la kunveno: *tradukado*

Komputilo – Twitter – Facebook. Ni iom priparolis la komunikadsistemojn. Ne ĉiu scias, ke ankaŭ per "ordinara" komputilo oni povas uzi la "avantaĝojn" de *Twitter* kaj *Facebook*.

Nelly kaj Johan vizitis *Harm Roeters*, kiu resaniĝas post operacio. Ankaŭ *Björn* bezonas ankoraŭ iom da tempo antaŭ ol li estas resaniĝinta.

Nelly ricevis mesaĝon de *Pieter Engwirda* pri "ĝemelurboj".

Johan ĉeestis la konatan *HCC-borson* en Utreĥto kaj prelegis pri virtualaj komputiloj. Antaŭe la borso allogis multegajn

interesiĝantojn kaj daŭris tri tagojn. Nun okazis unutaga evento, kaj ĉeestis pli-malpli mil personoj. Robotoj kaj maŝinoj por brodado allogis relative multajn homojn.

En Groningen Johan vizitis alian borson, la unuan *Mini Maker Fair* en Eŭropo. En ĉi tiu borso partoprenis precipe junuloj. Estis interalie tridimensiaj printiloj. Tiuj printiloj ne printas tekstojn kaj bildojn per inko sur paperon, sed ili faras tridimensiajn objektojn el plasta materialo. Oni povis ankaŭ admiri du robotojn, kiuj kapablas sidiĝi sur plankon kaj stariĝi memstare.

Wil disdonis foliojn kun frazoj, kiujn ŝi tradukis el la nederlanda lingvo en Esperanton.

Ni klopodis retraduki la frazojn en la nederlandan. La frazojn kompilis *Rob Moerbeek*. Estis amuza kaj lerniga programero.

Luit Staghouver

15 novembro 2012



La jarkunveno de Esperanto Nederland okazos la 22-an de junio 2013. Esperanto Nederland ĉiam havas distran programon post la formala jarkunveno. Ĉi-jare oni invitis *Kajton* por kanti. Kaj kiel kutime la posttagmeza programo estas senpaga. Sed rimarkigo: tio validas nur, se oni partoprenos ankaŭ la jarkunvenon. Ĉi tiuj informoj de Ineke estas bona komenco por nia klubkunveno en la 15-a de novembro.

Wil informis, ke ŝi vizitis la studosemajnfinon en Schoonloo. Ĉeestis tri personoj kiuj venis pro la anonco en la revuo *Onze Taal*.

La sekva UK okazos en Islando. Ineke jam aliĝis. Wil ricevis donace la libron *Islandaj Pravoĉoj* (malnovaj islandaj rakontoj tradukitaj de *Baldur Ragnarsson*). Tio estas bona komenco konatiĝi kun Islando.

Wil vizitis maljunan membron, kiu eklernas uzi komputilon. Wil uzas komputilojn jam dum multaj jaroj. Por ŝi

muso estas utila indikilo. Sed por komencantoj ĝi povas esti ilo timiga. Ili do praktikas per oranĝo.

Ni mallonge parolis pri ĝemelurboj. *Pieter Engwirda* estas tre entuziasma pri sia projekto: ĉiu urbo, kiu havas ĝemelajn rilatojn kun alia urbo devas esti menciata en la Esperanta *Vikipedio*, kompreneble kun ligilo al siaj ĝemelaj urboj. Detaloj pri lia projekto troviĝas en *FEN-X*. Pieter serĉas volontulojn por realigi sian projekton.



granda aŭ malgranda...



La temo de la vespero estis la vojaĝo de Nelly kaj ŝia edzo Jan al Hindio. En la laborejo de Jan finstudas multaj hindoj. Du el ili enamiĝis en Nederlando, sed

tamen en Hindio geedziĝis. Jan kaj Nelly estis invititaj al la festo.

fanfaro



Ni do vidis multajn bildojn pri la festo, kaj ankaŭ pri la preparado al ĝi, ekzemple la plibeligado per henaar tatuado. Ankaŭ Nelly havis henaar tatuadon, kiu restis videbla dum preskaŭ monato.



La geedziĝfesto daŭris kelkajn tagojn. Nelly restis kelkajn semajnojn en Hindio. La parencoj de la geedza paro gvidis Nelly kaj Jan al multaj gravaj temploj. Kiam Nelly pensas pri la longa ŝtuparo al la templo, ŝi denove rememoras la

varmon de Hindio: 45 gradojn, dum la rikoltantoj laboras sur la kampo. Nelly montris al ni la festarion, kiun ŝi ricevis. Fakte sario estas nur granda peco da tolo bele ornamita. Aŭ pli ĝuste: la partoj kiuj restas videblaj estas bele ornamitaj, la suba parto de la vindvestaĵo estas pli simpla. Finfine ni povis gustumi tipe hindajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Mi rimarkis, ke kokoslakton mi ne ŝatas, sed rostitaj pizoj estis tre bongustaj.

(vi trovos la recepton en ĉi tiu revuo)

Johan Swenker

29 novembro 2012

Ĉeftemo: *Vintraj tradicioj*

Ineke kunportis kelkdekojn da (malnovaj) libroj, kiujn donacis s-ro *Wilkins* (94-jara), iama membro de la Esperanto-klubo. Ni ĉiuj povis elekti librojn laŭ propra gusto, la aliajn librojn kunportis Wil, kiu publikigos la titolojn sur la konata listo kaj sendos la librojn al eventualaj interesiĝantoj.

Wil vizitis UEA-on pro la Malferma Tago kaj ĉeestis interalie prelegon de *Humphrey Tonkin*. Li skizis superrigardon de la historio de Esperanto kaj komparis ĝin kun la hodiaŭa, pli moderna situacio. Eble Interreto estos solvo, sed en kiu maniero?

En la libroservo Wil aĉetis libron por donaci al *Frank*, juna entuziasma lernanto. Ŝi aĉetis ankaŭ libron kun ekzamenekzercoj.

En *NRC Handelsblad* Ineke legis pri konkurso por junuloj. Kiu povos plej rapide sendigi poŝtkarton ĉirkaŭ la mondon? Ni opinias la konkurson tre interesa, sed bedaŭrinde nia klubo ne

havas membrojn en la celita aĝokategorio.



Pro la ĉi-vespera ĉeftemo Wil kunportis vintromezan kornon. Antaŭ multaj jaroj amiko donacis al ŝi la blovinstrumenton, kiu estas unu kaj duonan metrojn longa. En la regiono *Twente* oni ankoraŭ blovas la "kornon" okaze de Kristnasko por forpeli la fantomojn kun malbonaj intencoj.

Blovante la kornon, kelkaj el la ĉeestantoj sukcesas aŭdigi iom da bruo.



Kelkaj aliaj vintraj tradicioj estas: Lucia-festo kun kandeloj (Svedio), sketkonkurso tra la dek unu urboj de Frislando, naĝado en malvarmega akvo, kristnaska pudingo, viskio (aŭ Loranto (Anglio)), manĝado de meleagro. En Aŭstrio oni ofte manĝas fiŝaĵon de karpoo okaze de Kristnasko. Ne de *Patro Kristnasko* la infanoj ricevas donacojn, sed de la krist-ido (Jesuo).

La kristnaska arbo originas el Germanio. En Anglio la kristnaskaj donacoj restas sub la arbo dum kelkaj tagoj antaŭ ol oni elpakas ilin. La porinfanaj donacoj estas pakitaj en ŝtrumpojn. En Danio oni dancas ĉirkaŭ la kristnaska arbo, kaj

anaso estas la ĉefa kristnaska manĝaĵo. En Francio oni regalas sin per anasaĵo kaj ĉampano.



En Belgio kaj Francio la dua kristnaska tago ne estas festotago, en kiu la vendejoj estas malfermitaj. En Hispanio okaze de vespero de Silvestro (la 31-a de decembro) aŭdeblas sonoriloj, kaj oni manĝas vinberojn.

Ankaŭ en Esperanto-kastelo *Grésillon* (Greziljono) okazas jarfina festo, dum kiu la partoprenantoj estas strange vestitaj. Gonda kunportis sian kolekton de "Vintraj libroj". Tiujn librojn eldonis la revuo *Margriet* en la periodo 1939 ĝis 1988. Entute estas 36 eldonoj. Gonda posedas jam 17 de tiaj libroj. Plaĉas al ŝi precipe la desegnitaj kovriloj. La kovriloj montras la pasadon de la tempo.

Pro feriado sur la Kanariaj Insuloj Ineke ne ĉeestos la venontan kunvenon, la Zamenhof-vesperon. Nelly jam antaŭe malanoncis sin. Ĉar ni scias, ke ankaŭ kelkaj aliaj regulaj partoprenantoj ne povos ĉeesti, ni decidis, ke la Zamenhof-vespero estu ordinara klubkunveno. Intertempe ni scias, ke pro la vetero la kunveno ne okazis.

Luit Staghouver

Esperanto-tago en Eindhoven

Sabaton, la 8-an de septembro 2012 okazis en Eindhoven Esperanto-ekskursotago de *TRE-PEKE* (Translima Renkontiĝo Esperantista - Peel/Kempfen) Partoprenis 22 personoj el Nederlando kaj Germanio. Ĉu ĉeestis ankaŭ belgoj, mi ne scias. La kaŭzo de mia partopreno en la ekskursotago estas *Frank*, la nun 13-jara knabo, kiu lernis Esperanton memstare per mia kurso en Interreto. Li loĝas en la proksimeco de Eindhoven. Mi informpetis, ĉu li eble ŝatus renkonti aliajn esperantistojn, inter ili mi. Li entuziasme jesis, kaj je la deka matene lia patrino alportis lin per aŭto al la startejo. Montriĝis, ke li kapablas kompreni Esperanto-paroladon kaj povas uzi la lingvon buŝe. Estis agrable renkonti tiun junan knabon, kiu interesiĝas ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri multaj aliaj aferoj kiel muziko, astronomio, k.t.p.



Ĉeestis ankaŭ du germanaj inaj samaĝuloj, el kiuj certe la pli granda parolas Esperanton flue. Ŝi estis 14-jara, la fratino 12-jara. La vetero estis bela, kaj ni amuziĝis ĝis la kvina kaj duono posttagmeze. Tiam venis fratino de Frank por transporti lin per aŭto hejmen, kaj mi estis transportita al la stacio. Ni do ne partoprenis kiel la aliaj la

vespermanĝon. Estis agrable interesa tago. Dankon al la organizantoj *Twan Gremmen* kaj *Ralph Schmeits*!

La programo estis:

- akcepto kun kafo kaj teo
- vizito al *Strijp-S* kaj dezajnekspozicio
- pikniko kaj promeno en *Philips-Van-Lennep*-parko
- vizito al kaj partopreno en Festivalo por kreemuloj
- vespermanĝo en vegetara restoracio

Tasko

En la vintro-libroj de Gonda legeblas multaj mallongaj rakontoj pri vintraj tradicioj. La redakcio pensis, ke estos agrable tasko traduki kelkajn rakontojn el nia regiono!

Bonvolu traduki:

1: *Op de eerste dag van het nieuwe jaar voert men in het Friese dorp Folgeren een merkwaardig ritueel op. Om het ongenoegen te demonstreren over bepaalde zaken die in het achterliggende jaar verkeerd gingen, of juist instemming te betuigen met dingen, rooft men monumenten uit andere dorpen. Het gaat hierbij vaak over plaatselijke (politieke) kwesties. Ooit werd zelfs een straaljager binnengehaald.*

2: *Al heel lang voert in het Drentse Ruinen op tweede kerstdag een traditionele wandeling langs een schaapskooi, waar de deelnemers zich kunnen vergapen aan pasgeboren lammetjes. De lammetjes worden gezien als teken dat midden in de winter het nieuwe leven weer terugkeert.*



3: Een kerstboom in de mast.

Een van oudsher Scandinavisch gebruik, overgenomen door de Groninger schippers, is het in de mast hijsen van een kerstboom, ruim een week voor Kerstmis. Zo geven schipper en bemanning aan dat zij op de terugreis zijn om thuis het kerstfeest te vieren.

Het is niet alleen een teken van vreugde over de aanstaande thuiskomst. Schepen die een kerstboom voeren, geven daarmee tevens aan dat zij bereid zijn brieven en pakketten van zeelieden die Kerstmis op zee moeten vieren, mee te nemen naar de wal.

Het gebruik dateert uit de tijd dat schepen nog geen radioverbinding hadden. De boom was meestal een geschenk van een Scandinavische houthandelaar aan de zeelieden die bij hem een vracht kwamen laden voor de Nederlandse markt.

Recepto

Rostitaj kikeroj



1 skatolo da kuiritaj kikeroj
 3 supkuleroj da olivoleo
 spicoj : ekz.
 1 tekulero da ajlo el tubo + 1 tekulero da ruĝa pipro el tubo
(freŝaj spicoj eblas, kompreneble. La tuboj troviĝas ĉe AH en la fridujo)
 aŭ 1 tekulero da ruĝa pipro + 1 supkulero da kareopulvoro
 aŭ 1 tekulero da ruĝa pipro + 1 supkulero da paprikopulvoro

-
- Antaŭ-varmigu la fornon je 180-200 gradoj.
 - Lavu kaj sekigu la kikerojn.
 - Miksu la oleon kaj la spicojn.
 - Miksu la spican oleon kaj la kikerojn
 - Metu ilin unutavole sur bakpladon aŭ en bakpaton
 - Baku ĉirkaŭ 45 minutojn en la forno ĝis krakmaĉa.
 - La bakdaŭro varias, do provu mem.

Bonan apetiton!

Karaj membroj kaj abonantoj,

Ankaŭ la pasintan jaron mi petis de vi en *La Verda Stelo* pagi la kotizon ĝustatempe. Ŝajne ne ĉiuj legis la koncernan informilon atente. Bedaŭrinde! Pro tio mi devis sendi plurajn mesaĝojn (multe pli ol plaĉas al mi) por atentigi tiujn membrojn kaj abonantojn, ke la ŝuldita kotizo ne jam estis pagita. Finfine ĉiuj pagis. Feliĉe!

Ĉu ĉi tiun fojon mia alvoko pagi ĝustatempe havos pli da sukceso? Mi vere dubas. Mi provokas vin pruvi la malon!

Sur paĝo 2 de la informilo vi trovos ĉiujn informojn bezonatajn por transkontigi la ŝulditan sumon. Mi anticipe dankas vin pro via kunlaboro.

Luit Staghouver (kasisto)

P.S. Mi sincere dankas la membrojn kaj abonantojn, kiuj jam pagis la kotizon por la jaro 2013.



Sudoko

Ĉu vi ŝatas solvi enigmojn? Nun ni havas sudokon por vi. Kial? Ni vidis, ke multaj revuoj kaj gazetoj havas enigmopaĝon. Do ankaŭ ĉi tiu *La Verda Stelo* havas enigmopaĝon.

La maldekstra sudoko estas ne tro malfacila, la dekstra estas pli malfacila, sed tamen bone solvebla.

Subtabelo estas ĉiu el la 9-fakaj kvadratoj, el kiuj konsistas sudoko. Solvi sudokon signifas meti ciferon en ĉiujn liberajn lokojn tiel, ke cifero estu nur unufoje en ĉiu linio, en ĉiu kolumno kaj en ĉiu 9-faka subtabelo.

7	1		3		8			
8		9	2				1	5
	5	2	4	1				
5	6			4	1	8	3	
		1				7		
	2	3	8	7			4	1
				8	5	1	7	
1	3				4	9		8
			1		3		5	4

			8	1	5	2	3	
			9					8
		2	4	6		5	1	
3		6				1		
	5		1		6		2	
		4				6		3
	9	5		4	1	8		
6					9			
	8	3	6	5	2			

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen